

Federacia kongreso en Pézenas (24 IV)

Post dujara paŭzo pro la UK de Montpellier la federacia kongreso okazis en Pézenas la 24an de Aprilo. Partoprenis pli ol dudek personoj. Kelkaj atenditaj personoj ne venis sed kelkaj neatenditaj personoj venis, speciale kvaropo el Arles. Ĉiuj departementoj estis reprezentataj krom Gard .

Post salutvortoj de la federacia prezidanto Jean Hénin kaj senkulpigo de pluraj federacianoj, ĉiu sin prezentis rapide. Post skiza prezento de la E^o-movado kaj de la federacio, JH priskribis la nunan staton de la federacio kaj bedaŭris la mankon de informado kaj de kunlaboremo inter esperantistoj. Je la riproĉo de nepozitiva prezento, li respondis, ke bilanco devas esti realisma. Iuj grupoj funkcias bone, aliaj malpli bone. La "semajnoj" de Batipaume kaj Sète regule funkcias, la UK estis kompreneble eksterordinara evento sed ĝi ne estu la fino de niaj streboj ! La federacia bulteno aperas regule, tamen grupoj informu pli regule kaj detale. Kadre de "Réinsertion et E^o" Thierry Saladin aktivis kaj kontaktis diversajn asociojn kaj lernejojn. Ŝajnas, ke gejunuloj sin organizas kaj ni povas esperi baldaŭajn rezultojn.

La financa stato de la federacio estas bona, ĉar nia kasistino Lucette Négron ŝpareme prizorgis la kontojn.

La federacio dediĉis 16 000 F por la UK . Dank' al promesita profito de postkongreso (post la UK) ni povas utile uzi sumojn por relanĉi esperanton en la regiono. Estas dezirate, ke la diversaj taskoj ne koncernu nur kelkajn personojn sed estu dividitaj inter komisionoj (po 3 homoj ekzemple), ankaŭ ke en la nova estraro (la tuta komitato estas renovigebla/enda) la postenoj estu duoblaj : prezidanto kaj vicprezidanto, sekretario kaj helpsekretario, kasisto, helpkasisto. La nova komitato konsistos el inter 15 kaj 21 homoj, en la momento estas 15 nomoj. Ni kompletigos en oktobro kaj tiam elektos novajn komitaton kaj estraron. Ankaŭ tiam ni konigos la konsistigon de la komisionoj (interna informado, ekstera informado, varbado, junuloj, rebato, renkontoj, forumoj, vojaĝoj...). Sin proponis por kunrespondeci pri "Sudfrancia Stelo" Francis Bernard kaj por helpi la kasistinon Patrice Brandy.

La statutoj ankaŭ bezonas ĝisdatigon kun klara difino pri la rolo de la federacio, de la komitatanoj (ili proponu kaj helpu konkretigi) , ni pasigis duonhoron por la proponoj de modifoj kaj la sekretario Charles Gérard prezentos okaze de nia aŭtuna kunveno version de la novaj statutoj.

Agad-proponoj : ili estis sufiĉe multaj . Ne eblas citi ĉiujn intervenintojn . La novaj paneloj de la grupo de Montpellier estas disponeblaj por ekspozicioj. Same pri la elektronika panelo aĉetita de la federacio kaj tute taŭga / alloga por forumoj. Nova kvadrata broŝureto de UFE/JEFO, kiu kostas nur 2F50, estas rekomendebla (por informi, donaci dum forumoj, ktp), ni mendos kvanton, disdonos kelkajn ekzemplerojn al ĉiu grupo. (Laŭ lastminuta informo, tiu broŝuro estas elĉerpita sed nova eldono aperos en septembro).

La turneo de Ges. Robineau (okjara vojaĝo tra la mondo pere de E^o) kontentigis ĉiujn invitintojn (en nia regiono nur en Pézenas / raporto sur alia paĝo) kaj restas la plej bona maniero reklami pri esperanto .

Propono konfirmota en oktobro de unu prelego en ĉiu departemento, pagota aŭ parte pagota de la federacio.

Ĉiu povas jam informiĝi pri la ebleco organizi tiun prezenton kune kun alia asocio .

Propono de donaco de ilia libro en la franca al kelkaj bibliotekoj . Presigi en formato de poŝtkarto la panelon kun la respektivaj ampleksoj de la lingvoj (C. Gérard konas iun en Katalunio) . Restarigi la prelegvojaĝojn, se UFE ne plu faras. Organizati komune kun niaj najbaroj (SudPireneoj kaj Katalunio) .

Ĉar neniu partoprenos la nacian kongreson en Fournols (mankis informoj pri ĝi), neniu estas komisiita.

Gaston Blary invitas al la 90a datreveno de la grupo de Arles; la festo estas prokrastita ĝis la 19a de septembro .

Post la tagmanĝo oni donis diversajn ekzemplojn de jam efektivigitaj agadoj. Thierry Saladin raportis pri la asocio "Réinsertion et E^o" kaj respondis la diversajn demandojn . Ŝajnas, ke post 12 aŭ 18 monatoj eblos dungi oficiale la unuan junulinon. Charles Gérard prezentis la gvidlibron en E^o pri Perpignan kaj vidbendon (pri koncerto de G. Handzlik kaj la UK). J. Hénin prezentis la elektronikan panelon. La provintoj bonsukcesis ! Entute sufiĉe densa tago. Dum la aŭtuna kunveno, en oktobro post la forumoj de septembro, ni kompletigos la komitaton, elektos la novan estraron kaj konfirmos la proponojn elektotajn.

P.S. Specialan dankon al Mado Vidal, kiu bone organizis tiun tagon. La tagmanĝo en restoracio Catar rikoltis unuaniman laŭdon. Ĵurnalistino de "Midi Libre" vizitis nin, ni donacis al ŝi la kvadratan broŝureton, por certi, ke aperos nur ĝustaj informoj. Ve ! vidu la rezulton ! Temas pri antaŭjuĝo kaj tre konciza informo. Mado decidis doni sian propran artikolon al la oficejo de "Midi Libre" en Pézenas, kiu rifuzis (pro la jam aperinta artikolo).

Mado portis la artikolon al la oficejo de "Midi Libre" en Béziers, kiu aperigis ĝin ! Neniame rezigni !

Honorvino estis promesita de la urbdomo post la matena kunveno. Fakte estis boteloj, glaso, olivoj kaj ternuksoj sed neniu el la urba konsilio. Ni do trinkis trankvile inter esperantistoj ! Grandanime ni tamen donis al Thierry Saladin, kiu rendezvuis kun la urbestro, la libron de Ges. Robineau por la urba biblioteko.

La aŭtuna federacia kunveno okazos en Béziers -je la 10a horo en la Domo de asocioj (500 m post la stacidomo/direkto al Narbonne) sabaton, la 2an de oktobro Ĉiuj aktivaj esperantistoj estas kore invitataj. Jam bone notu kaj ne forgesu ! Ĝis !

CONGRES

L'Espéranto et ses représentants

■ Le Congrès régional de la Fédération Languedoc-Roussillon d'Espéranto a eu lieu cette année à Pézenas.

Les délégués des divers groupes espérantophones des Pyrénées-Orientales, de l'Aude, du Gard, de la Lozère et de l'Hérault, se sont réunis en salle Bonnafous pour faire un tour d'horizon sur leurs

activités passées et en cours. L'Espéranto, langue neutre de communication, plutôt boudée jusqu'à maintenant, voudrait se développer un peu plus de par le monde. Cette journée leur a permis également de faire la connaissance de Pézenas, après avoir assisté à la projection de films prévue au cinéma Molière. ●



Des délégués de région venus de tout le Languedoc-Roussillon.

Compte-rendus sur le congrès parus dans "Midi Libre". A gauche compte-rendu d'une journaliste, à droite compte-rendu d'une espérantiste, Mado Vidal.

Cercle biterrois d'Espéranto

■ Samedi 24 avril, par petits groupes, des espérantistes arrivaient à Pézenas au congrès régional d'Espéranto. Ces délégués de la région apporteront le salut des amis des différents départements du Languedoc-Roussillon.

Ce congrès a permis de procéder au renouvellement du bureau (un tiers chaque année); de trouver des moyens de faire passer l'information auprès du public, qui méconnaît l'importance d'une langue économique, politique neutre. Le rôle des médias, et la place de l'anglais ont été discutés.

Plusieurs sections espérantistes spécialisées (philatélistes, cheminots) sont venues prouver sa vitalité. Il est ressorti des débats qu'une meilleure coordination régionale entre ces entités était nécessaire. Cependant tous ces groupes se retrouvent dans la même mouvance internationale. Cette pénétration dans tous les pays du monde, de l'Espéranto, est la preuve de son efficacité, de sa solidité.

Le programme comportait aussi la rénovation des statuts. Toutes ces discussions ont été très denses, très animées et plus longues qu'il était prévu, avant un repas agréable, servi par le CATAR (Centre d'Aide par le travail autonomie Réinsertion). En conclusions, « la diversité, la richesse des interventions, ont montré que loin de l'image péjorative qu'on lui attribue trop souvent, l'esperanto est une langue d'avenir ». ●



La France accepte le plurilinguisme

La France vient finalement de signer la Charte européenne des langues régionales ou minoritaires. Cette charte, qui reconnaît comme patrimoine culturel les langues parlées dans le pays, a été adoptée en

1992. Mais la France ne voulait pas la signer la jugeant contraire à sa Constitution, qui affirme que "le français est la langue de la République". Désormais, il reste à établir la liste des langues régionales qui bénéficieront de la protection de la charte. Un rapport vient de recenser 75 langues parlées sur tout le territoire (dont une cinquantaine dans les Dom Tom)... Reste aussi la ratification de la charte par le Parlement...

Le texte ci-dessus, paru sur Internet avant la décision du Conseil Constitutionnel, n'indique pas que l'opinion publique est partagée sur la place à donner aux langues régionales.

Ci-contre courrier de Mme Bayou dans la tribune des lecteurs de "Midi Libre" (M. Bayou faisait partie des députés qui avaient déposé une proposition de loi favorable à l'espéranto).

Un autre lecteur a contesté cette lettre, prônant le bilinguisme et affirmant que la langue internationale est "l'anglais, langue facile et évolutive"... Affaire à suivre. L'an dernier, l'alsacien-mosellan était enseigné à 194.222 élèves, le basque à 5.401, le breton à 14.567, le catalan à 6.781, le corse à 27.459 et l'occitan-langue d'oc à 68.894 (chiffres cités dans "Dossier Familial"). La même revue concluait sur l'enseignement d'une langue vivante étrangère au primaire : on reste très loin des résultats qu'on pourrait attendre...

Charte

14 VI

■ Je tiens à dire à quel point je suis d'accord avec André Capus (*Votre avis* du 17 mai) qui est contre la charte des langues régionales. Je respecte les langues régionales. Elles sont une des richesses de notre pays et je trouverais normal leur enseignement facultatif dans nos classes. Mais il est aberrant de créer des écoles où la langue régionale se substitue au français, où on apprend toutes les matières (histoire, géographie, sciences, etc.) en occitan, en breton ou en basque et où le français est appris comme une langue étrangère (sic).

Que devient le français dans ces conditions et que devient la France découpée en morceaux suivant les régions ? Et

que deviennent les nations d'Europe ? Nos anciens, au début du siècle avaient compris que la langue est le ciment d'une nation. Grâce à eux, tout le monde a pu se comprendre d'un bout à l'autre de l'hexagone. Allons-nous régresser et dresser la barrière de la langue entre les différentes régions ? A l'heure de l'Europe, c'est d'une langue internationale dont nous avons besoin pour mieux comprendre nos voisins, devenus nos amis. Nous voulons construire l'Europe de la paix. Comment réaliser ce rêve merveilleux si, à la base, les langues se multiplient ? A-t-on oublié l'histoire de la tour de Babel ?

Mme Vve Raoul BAYOU
(Saint-Chinian)

VIVO DE LA GRUPOJ

BEZIERS

Jen la somera paŭzo kaj la momento rigardi malantaŭen sed precipe antaŭen. Pri la pasintaj monatoj, kelkaj malfacilaĵoj pro diversaj malsanoj. Tamen, fine, ĉio iris preskaŭ glate, de la Z-tago ĝis la kursoj (Pézenas, Creissan kaj Béziers) pro la sindonemo de bonvolemluloj. Dankon al ĉiuj.

La staĝo en Agde funkciis bone kun ĉirkaŭ 30 homoj. Ni bedaŭris la mankon de eksterlandanoj : 2 Ganaanoj aliĝis sed ... ne venis. Tri kursoj okazis, ankaŭ ekzamenoj. La kandidatoj de la Atestoj pri Lernado kaj Praktika Lernado sukcesis. Pri Kapableco, ni ankoraŭ ne konas la rezulton.

Staĝano el Sarreguemines prezentis interesan prelegon « Homaj rajtoj, lingvaj rajtoj ». La lastan vesperon, niaj grupanoj ge-Passarella konigis al ni la brazilan lernejon « Bona Espero » dank'al paroladeto kun videofilmo. Tie ili laboris dum 2 jaroj (antaŭ 20 jaroj) kaj nun intencas reiri tien. Ni bedaŭros ilian foriron sed deziras al ili fruktodonan laboron en ilia nova vivo.

Ni kune piknikis en Creissan ĉe J.C.Roget la 26an de junio.

Nun, ni turniĝu al la venontaj monatoj. La 4an de septembro, nia unua kunveno estos dediĉita al la preparo de foiroj de Asocioj, la 11an de septembro en Béziers sur la promenejo Allées P. Riquet, la 18an de septembro en Agde post peto de la urbestro. Ni esperas ke dank'al Christian kaj ankaŭ al aliaj bonvolemluloj ni sukcesos interesi plurajn homojn. Sed ekestos problemoj pri la organizo de la kursoj : mankos gvidantoj. Tio estas alvoko al novaj instruantoj (en Agde, se necesas kaj Béziers). Eble la ripozo de somero donos kuraĝon al kelkaj deĵori en tiu fako. Anticipajn dankojn.

VENONTAJ KUNVENOJ

Ĉiam sabate je 14h30 en « Maison des Associations » : **4an de septembro , 9an de oktobro, 13an de novembro.**

La Z-tago okazos kiel kutime en decembro. Ni ne definitive fiksas daton kaj lokon. Certe ili aperos en la venonta SFS.

Nun, novaj lernantoj, laboru iomete dumsomere por ne forgesi kion vi studis en la kursoj ! Bonan someron al ĉiuj.

MONTPELLIER

1) RAPORTO PRI NIA MONATA KUNVENO DE LA 3A DE JUNIO 1999

En la ĉiesdomo « l'Escoutaire », ĉeestas 7 homoj inter la 18a kaj la 19a horo kaj duono.

Sinjoro DAUVERCHAIN, nuna prezidanto de la « Université du Tiers-Temps », favoras esperanton kaj pretas helpi nin por trovi kunvenejon kaj faciligi kursojn, kompreneble por la « sufiĉaj maljunuloj ».

Laŭ paroladoj inter kelkaj el niaj membroj, ni devas serĉi novajn metodojn por venigi kiel eble plej multe da homoj al tiuj kunvenoj, kaj ankaŭ elekti ĉu aliajn lokojn, ĉu aliajn horojn. Malfacilege estas kontentigi ĉiujn.

2) DATOJ KAJ PROGRAMOJ de la venontaj kunvenoj :

12-09-1999 : Foiro de Asocioj en Antigone 07-10-1999 : Floroj de la montpellieraj ĝardenoj

04-11-1999 : Problemo de la lingvaj minoritatoj 02-12-1999 : Jara kunveno de nia asocio

3) INTERNACIA ESPERANTOSEMAJNO EN SETE

La loka esperantoklubo rememorigas al vi la internacian esperantosemajnon, kiu okazos en Le Lazaret (urbo Sète), de la 28a de aŭgusto ĝis la 5a de septembro 1999. Vi povas ankoraŭ aliĝi, skribante al la sidejo :

5, Rue du Docteur Roux 34090 MONTPELLIER, aŭ telefonante (telefono kaj fakso) al 04.67.54.15.43.

Dum tiu staĝo, ankaŭ okazos seminario A (metodo Cseh) kun Attilio Rojas Orellanos.

4) ESPERANTOFESTO EN MONTPELLIER GRAMMONT kiu okazis la 2an de majo de la 12a ĝis la 19a horo :

Ĉirkaŭ 40 homoj partoprenis, inter kiuj multaj lernantoj komencantaj. Notindas ke la Polo Sinjoro Rubek paroladis pri sia urbo TORUN (cetere ankaŭ tiu de Copernic) kaj rakontis fabelojn, kiuj kaptis intereson de la ĉeestantaro.

5) UNIVERSITATO DE LA TRIA TEMPO :

Kurso por komencantoj (du niveloj) okazos post la ferioj en salono Pétrarque ĉiuvendrede inter 9h30 kaj 11h30. Volontutoj por instrui al la 2a kaj 3a niveloj estas bonvenaj.

PERPIGNAN

Nia kultura centro organizis piknikon je la 20a de junio en Argelès sur Mer ĉe sinjoro Llech-Walter.

La **8an de oktobro** okazos nia ĝenerala kunveno. La 16an de oktobro : « Malfermitaj Pordoj » ĉe nia kultura centro . Ni intencas partopreni la foiron de la Asocioj.

Nia kultura centro ankoraŭ disponas pri 2 vidbendoj (koncerto + UK) po 65 F + sendkostoj kaj 2 libretoj pri Perpignan (po 50 F) .

ASOCIO « REINSERTION ET ESPERANTO » (Thierry SALADIN)

Ĝi daŭrigas E-kursojn. Tri lernantoj trapasis la unuagradan ekzamenon.

Multaj prelegoj okazis tra la tuta regiono, kaj eĉ pli fore, en kolegioj, liceoj, ktp. Ili kunigis kelkfoje malmultajn homojn, sed iafoje kelkajn dekojn. Ekzemple : 50 en Pézenas, la 18an de januaro, 60 en Béziers, la 25an, 60 en Lycée Clémenceau, la 25an de marto, 70 en Nîmes, la 1an de aprilo, 55 en Ganges, la 7an de majo, ktp, ktp...

Aldoniĝas staĝoj (Ekzemple : por 3 komencantoj en Montpellier la 12an kaj la 13an de junio).

OLIVA SEMAJNFINO

En Maury, apud Perpignan, la lastan semajnfino de junio, okazis la 11a gastronomia renkonto de Jefo. Olivo estis elektita kiel simbola temo. Multajn receptojn enhavantajn tiu frukto realigis kaj gustumis la 24 partoprenantoj.

Ankaŭ aparte interesa estis la malkovro de la regiono : Tautavel, Queribus, Collioure, Cucugnan kaj ĝia legenda parokestro. La « Sardane », folkloran dancon, konatigis la 10 Katalunoj al la Parizanoj kaj aliaj Francoj kiuj faris longan vojaĝon (eĉ ekde Mulhouse).

Ni tre ŝatis la vinon de Maury kiu tute anstataŭis la forestantan sunon.

Ni notu la venontan rendevuon : la **vinbera semajnfino** okazos en Edenkoben, Palatinato, de la 10a ĝis la 12a de septembro 1999.



Jefo denove organizis gastro-nomian semajnfino en suda Francio. Post la fiŝa semajnfino

apud Montpellier en marto 98 kaj munjetada semajnfino apud Tuluzo en oktobro 98, okazis de la 25a ĝis la 27a de junio 99 la oliva semajnfino apud Perpignan. Estis bona ŝanco por renkontiĝi en Katalunio proksime de la limo. Kun olivoj kaj oliva oleo, multegaj pladoj fareblas. Krom saneco de tiuj produktoj ilia

gusto estas rimarkeble delectinda kaj larĝe ŝatata. Dum tiu semajnfino ni povis ankaŭ gustumi aliajn lokajn pladojn, kun plej diversaj legomoj kaj fruktoj, kiuj abundas en la regiono Rusiljono. Oliva semajnfino estis "bongusta semajnfino" !

La klimato de la plej suda parto de kontinenta Francio estas tre favora al kultivado de simpatiaj kreskaĵoj kaj arboj, favore influitaj de la Mediteraneo kaj de la ofta sunbrilado.

Ni havis la okazon por ekskursi kaj viziti ĉirkaŭan kamparon, kie interalie kreskas belaj vitoj


Pro la sezono kaj la geografia loko de la oliva semajnfino oni kutime ĝuas la varmecon kaj la belecon de la vetero. Ĉar tiu semajnfino estis la unua de la somero, ni antaŭvidis sun-okulvitrojn kaj bankostumojn. Fakte mankis iom da suno (vetero ne estas mendeblo) sed ne mankis varmecon en la etoso de tiu oliva semajnfino en Katalunio. Ni rendevuis por la venonta semajnfino en **septembro en Germanio.**



Okcitana

Los rescontres gastronomicas d'Esperanto-Joves son l'occasion de descubrir las culturas de las nòstras regions, al través de temas gastronomicas mas tambien pels contactes ambe d'associacions localas. Demest aquelas, Artisans del Monde nos farà profièitar sos produches naturals e de la siá etica d'un comèrci equitabile per una mai granda solidaritat a l'escala de la planèta. Pertot la vida associativa ten una importància particulara per sensibilisar los joves en favor de lor cultura regionala. Aurèm atal l'occasion de descubrir una lenga per cada tres rescontres a la tardor de 1999, adoncas tres maravilhas al còr del monde. Coma serèm a cada còp prèp d'una frontièra, convidam los esperanto-parlants nòus de cada man d'aquelas barrièras imaginarias a profiatar d'aquelas escasenças per practicar la lenga internacionala per lor mai grand plaser.

Vidu ankaŭ la gazet-eltranĉaĵon sur paĝo 8



Printempaj kongresoj :

Sat-Amikaro kongresis en Franĉkonte proksime de Montbéliard. 171 partoprenantoj (5 el nia federacio) el 8 landoj kolektiĝis en vilaĝo Glay (207 loĝantoj). Densa programo : vizitoj, artaj vesperoj (folkloro, muziko kun Ĵak Le Puil kaj Jean-Luc Nougaret), prelegoj (Bruno Robineau, Thierry Saladin, Petro Chrdle el Ĉeĥio), laborkunsidoj kaj ĝenerala kunveno, ampleksa libroservo, renovigo de strataj nomplatoj... Dum la lasta vespero, Michèle Freud deklamis poeziaĵojn kaj Anton Kiefer, Palatinata vinberisto, prezentis kaj gustumigis siajn altkvalitajn vinojn, konkurence kun la ĵurasaj. Tuttaga ekskurso mardon agrable konkludis la kongreson. Notinde, ke gejunuloj, kiuj samtempe organizis gastronomian semajnfino proksime, aldoniĝis por la vesperoj. Entute simpatia etoso, bela vetero, bela ripoziga regiono. La venonta (55a) Sat-Amikara kongreso okazos je Pasko 2000 en urbo Fouquières-lez-Lens.

Fervojistoj kongresis en Le Mans en Majo (Ĉielirado). Aliĝis ĉirkaŭ 250 personoj sed bulgara grupo ne povis veni. Ankaŭ densa programo kun ekskursoj kaj artaj vesperoj. La terminologia fako kompletigis baldaŭ aperontan plurlingvan leksikonon.

UFE kongresis pentekoste en aŭvernja vilaĝo Fournols. Neniu reprezentis nian federacion. Ĉar 150 personoj ne ricevis ĝustatempe voĉdonilon por renovigo de la komitato, dua baloto estis necesa kaj la rezulto ne estas konata. Raymonde Pérault, demisiis de la posteno de ĝenerala sekretario ; Olivier Moreau, juna parizano, anstataŭas ŝin. La venonta franca kongreso okazos kadre de la Eŭrop-Unia kongreso en Oostende (Belgio) de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo 2000.

Ĉe niaj najbaroj :

Midi-Pyrénées

La federacio kunvenis en Carmaux la 13an de junio kaj elektis novan estraron por unu jaro.
Konsilantino : Claude Nourmont, prezidanto : Floréal Martorell, vicprezidanto : Christian Beaumelou, kasisto : Arnaud Lagrange, sekretario : Christine Vidotto (kun la helpo de Christian Lavarenne).
La ĉefa tasko de la nova estraro estos konkretigi la organizadon de KAFE (kultura festivalo okazonta en Tuluzo en Julio 2000). UFE decidis dum la kongreso de Fournols subteni tiun aranĝon.
Ĉiuj bonvolemluloj estos bonvenaj en la organiza skipo.
Vidu sur p. 13 alvokon de EKC (Esperanto-kultura centro de Tuluzo) pri Kosovo.

*Jany kaj Georges Comte (Jorgos) ĝojas anonci la naskiĝon de Floréal la 2an de Majo.
Bonvenon al la frateto de Ĵasmin' kaj Rafael'.*

Provence

La bulteno "Provence Esperanto" reaperis kaj anoncis diversajn aranĝojn. La 29an kaj 30an de majo la federacio kunvenis en St Raphaël. La 90a naskiĝdatreveno de la kreado de la arleza grupo, planita la 13an de junio estis fakte prokrastita ĝis la 19a de septembro (sin turni al G. Blary 04 90 93 81 40). Tradicia finjara komuna tagmanĝo okazis en St Raphaël la 20an de junio kaj la 2a PACA- (regiona kaj paca ankaŭ !)-festo disvolviĝis en Gargas la 27an de junio.

Katalunio

Estas konfirmita la okazigo en Manresa inter la 30a de oktobro kaj la 1a de novembro de la 29a kataluna kongreso kaj 2a transpirena kongreso de E°. La elektita kongresa temo estas "ekologio kaj progreso".
Detalaj informoj aperos en la venonta SFS (en oktobro) sed estos disponeblaj en Julio ĉe SFS.
Pri la anoncita samdata mediteranea konferenco de LF-Koop en Sète (pri la E-fonetiko) kun ĉefprelegantoj Daniele Vitali kaj Michel Duc Goninaz estas kelkaj duboj pri la okazigo. Se estos konfirmo, detaloj ankaŭ aperos en la venonta SFS.

Staĝejoj :

Lastfoje vi povis legi detalojn pri la staĝoj de la Kvinpetalo en Bouresse (86).
Pri Greziljono estas konfirmita, ke disvolviĝos diversaj staĝoj (necesos loĝi ekstere) :
24-31 VII : por komencantoj (Grzybowski); lingvistiko kaj gitaro ; vortaro kaj tradukado
1-7 VIII : Peckudrado kaj kursoj (Lagrange, Moirand, Grzybowski)
8-14 VIII : Kursoj (Moirand) kaj joko
15-21 VIII : meznivela kurso (Rivière, Dumoulin) kaj teatro. Kontaktadreso : 02 41 82 55 22/89 10 34

28 VIII- 4 IX : 25a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo (Lazaret / Sète) . Informas : 04 67 54 15 43

*Lastminuta informo :
la Mediteranea konferenco
estas konfirmata.*

DIVERSAĴOJ

Coursan (11) : Dum la tritaga festo de la komunista partio en Coursan estis budo pri esperanto. Prizorgis ĝin W. Luttermann, helpis du membroj de la grupo de Béziers.

UK de Berlino : 31 julio - 7 aŭgusto.
En aprilo jam estis aliĝintaj pli ol 2300 personoj, inter kiuj la dekonono el Francio. La temo estas : "tutmondiĝo - ŝancoj por paco ?"



UK de Tel-Avivo : 25 julio- 1 aŭgusto 2000.
La aliĝiloj jam aperis. La kongreskotizoj ĝis la 31a de decembro (unua periodo) estas en eŭroj :
-individua membro de UEA : 110
-ne individua membro : 138
-kunulo-junulo- handikapulo mem individua membro de UEA : 55
-same sed ne individua membro : 82

Amikeca Reto : la nova libro 1999-2000 aperis kun pli ol 400 adresoj en 40 landoj . Novaj landoj en la listo estas Makedonio, Benino, Usono, Alĝerio. La listo haveblas kontraŭ 70 F + 10F sendkostoj de "Amikeca Reto, 88 Rue V. Hugo, 37400 Amboise.

La Jarlibro 99 de UEA enhavas 1959 delegitojn en 100 landoj, kompare kun 1981 delegitoj en 94 landoj en 1998

Kiom da esperantistoj ? Al tiu malfacila demando eble vi ne kapablas fideinde respondi. Diru, ke ankaŭ gravas la disiĝo de la esperantistaro . UEA havis membrojn en 120 landoj en 98 (novaj landoj estis Burundio, Irako, Komoroj, Samoo kaj Zambio). Tiuj ciferoj estas en "Esperanto" de aprilo .

Nova vidbenda metodo de E^o kun la titolo "Pasporto al la tuta mondo" parte aperis. El la 15 lecionoj po 30 minutoj estas aĉeteblaj la 4 unuaj (81 €). Tiu kurso celas individuon aŭ grupan studadon. Ne nur komencantoj sed ankaŭ spertaj esperantistoj ĝuas la historion de la familio Bonvolo.

Vidbendo pri la UK de Montpellier estas aĉetebla ĉe UFE. Daŭro : 25 minutoj, prezo 135 F (125F ekde 3 ekzempleroj) + sendkostoj. La vidbendo estas montrinda al ne-esperantistoj, ĉar la tekstoj estas subtitoligitaj en la franca. Interese por la aŭtunaj forumoj de asocioj...

Kotopo , internacia kulturejo, 14 Rue Leynaud en Liono funkcias nun ĉiun jaŭdon, de la 18a horo ĝis la 22a. Se vi havos okazon viziti Lionon, vi estos bonvenaj ĉe KTP.

Veko (servo de UFE) enketas pri kursoj kaj staĝoj, estintaj kaj estontaj (por anonci en septembra listo). Se vi ne ricevis la enketilon, petu kopion de SFS.

Okazas (speciala numero planita fine de septembro) Por tiu numero Veko ankaŭ sendis demandilon; same petu se necese kopion de SFS.

Gejunuloj dekkvinjaraj el Quissac (30), kiuj eklernis E-on, deziras renkonti najbarajn samaĝajn gejunulojn. Informojn bonvolu sendi al SFS.

Laborgantoj kun la vorto "esperanto" estas proponataj de TAKE :
-paro blanka-verda : 20F (sendokostoj 8F por unu paro, 16F por 2 aŭ 3 paroj, 24,50F por 4/7 paroj)
-paro kolora : 15F (sendokostoj 8F por 1 aŭ 2 paroj, 16F por 3 aŭ 4, 24,50F por 5 ĝis 8 paroj). Mendi ĉe: Take/A.Grossmann - 5 Rue des Pyrénées 68390 Baldersheim - ĉekoj je la nomo de Take .



Forumoj de asocioj anoncitas en nia regiono :
Béziers, la 11an de Septembro; Montpellier, la 12an de Septembro; Agde, la 18an de Septembro.
Partoprenu kaj helpu la deĵorontojn !

Sudaj aranĝoj : La 58a Hispana kongreso okazos en Castellon de la 17a ĝis la 21a de julio. Informas A. Casquero, fakdelegito en Valencia . Samloke disvolviĝos la 9a Eŭropa Forumo de la 21a ĝis la 25a de julio. La 7a internacia semajno de kulturo kaj turismo okazos en Cambrils (2-9 X)
La 7a internacia turisma semajno disvolviĝos en La Valetta - Insulo Malto (inter la 4a kaj 10a de septembro) .
La 68a itala kongreso estos en Riva del Garda fine de Aŭgusto (21-26 VIII).

DIVERSAĴOJ -daŭrigo-

Lernejo L. Zamenhof en Bialystok :

Ni lanĉis alvokon lastfoje koncerne la minacon al tiu lernejo. La ambasadorejo de Polio en Francio, kiu ricevis multajn protestleterojn, sciigis, ke sekve de niaj intervenoj, la polaj edukautoritatoj decidis plufunkciigi en septembro 99 la elementan lernejon n° 23 L. Zamenhof.

Peticio por E° kiel elekteleco je bakalaŭro :

Vi trovos tiun peticion sur paĝo Ne forgesu subskribi ĝin (kaj resendi), samtempe subskribigu viajn geamikojn, kiuj favorus tian decidon. En la momento la ŝancoj de enkonduko de E° en la edukistemon estas preskaŭ nulaj (ĉiu jam legis la pretekstojn de la ministerio). Eble limigata uzo de E° havos pli grandajn ŝancojn de sukceso.

UK de Berlino :

Okaze de la baldaŭa UK en tiu urbeĝo estis eldonita gvidlibreto 52paĝa "Berlino por turistoj" (helpilo por orientiĝi en la ĉi-jara kongresurbo). Prezo ĉe UEA : 2,60 Eŭro.


Jarfine en Germanio :

Tradicie gejunuloj kolektiĝas jarfine en Germanio por la konata Iso. Ĉijare ankaŭ eblos al "mezaĝuloj (personoj 25-55 jarojn aĝaj) kaj familioj partopreni la 16an Ikon (Internacian Festivalon) en Münster (27 XII-3 I). Informas : H-D. Platz, postfach 1148, DE 34303 Niedenstein

Lingvo-problemo en Eŭropo : ne grava

Tiel opinias konata Christine Ockrent laŭ intervjuo ("Lozère Nouvelle" 25 VI) pri nova libro de ŝi "Eŭropo rakontita al mia filo" (Eldonejo R.Laffont).

Henriette Walter, la konata lingvistino, estos en Greziljono la 26an de julio por prelego/debato pri la "lingva diverseco en Eŭropo"



UNIVERSALA KONGRESO 99 BALDAŬ EN BERLINO

Al la 84a Universala Kongreso ĝis la komenco de junio aliĝis iom pli ol 2350 personoj el 60 landoj. Kvankam la aliĝnombro estas alta, la organizantoj atendis superi la magian ciferon de 3000, kio sukcesis en la pasintjara Montpelliero.

La venonta UK en Berlino estos ja sendube granda kaj programriĉa. Speciale el la scienca vidpunkto: refoje okazos Nitobe-Simpozio, apud la tradicia Esperantologia Konferenco, okazos seminario pri lingvoj en la reto, kaj lokon havos ankaŭ speciala kunsido dediĉita al terminologio. La muzika kaj teatra programoj abundos kiel kutime, kaj la junularo havos sian kutiman programon, la etan IJK, kiu ja igas pli kaj pli alloga UKon por la gejunuloj. IKU kaj AIS-kursoj elstaros per kvalito kaj renomo: prelegos Humphrey Tonkin, Marjorie Boulton, kaj pluraj aliaj, sub la rektoreco de Nobel-premiito prof. Reinhard Selten.

El "Esperanto Ile de France

Les jeunes espérantophones se rencontrent à Maury

Parce que la Catalogne et la région de Perpignan sont réputées pour leur gastronomie riche et savoureuse, l'Association française des jeunes espérantophones, dont le siège est à Paris, a choisi Maury pour y organiser un week-end gastronomique sur le thème des olives, les 24, 25 et 26 juin. Après les divers thèmes gastronomiques déjà explorés (chocolat, fromage, choucroute, crêpes...) un nouveau prétexte permet à de jeunes Français, catalans, Allemands et peut-être d'autres pays de se rencontrer et de pratiquer la langue internationale espéranto. Les échanges au gîte de Maury seront d'autant plus nombreux que des participants n'ont pas pu se revoir depuis le Congrès mondial d'espéranto en août 98 à Montpellier, réunissant pas moins de 3300 participants espérantophones de 68 pays.

Pour informer le public, pour apprendre ou découvrir les possibilités d'ouverture sur le monde offertes par la langue internationale espéranto, le Centre culturel espéranto de Perpignan propose diverses formules de cours. Rens. au 04 68 55 51 77.

"L'Indépendant" (23/6)


Est-ce que la langue restera un obstacle ?

Pendant près de cinq siècles, il y a eu une langue commune, ou tout au moins un langage de référence : c'était le latin. On peut aussi se souvenir qu'au dix-huitième siècle l'Europe des élites était française. Il

est assez probable qu'une sorte d'anglais appauvri tiendra ce rôle dans les communications de base, sans pour autant que les différentes littératures en souffrent. On parlera anglais, ne nous cachons pas derrière notre petit doigt, mais cela n'est pas vraiment important.

Varbiloj (plurkoloraj) eldonitaj de UFE
Rekomendeblaj por la forumoj de asocioj kaj aliaj okazoj...

Le dépliant 4 volets
A diffuser largement,
tous publics.
Format 10.5x21 cm • 10 g



*Nova eldono de tiu broŝuro
aperos en septembro*



La brochure Mode d'emploi.
A diffuser aux personnes montrant un intérêt pour l'espéranto. tous publics.
Format 15x15 cm • 28 g

La pochette :
Pour inclure un dossier d'information (original photocopiable fourni sur demande contre 4,00 FRF). pour journalistes, enseignants ou institutionnels.
Format 22x31 cm • 49 g



* port en sus
Commandes et règlements à adresser à :
Espéranto-France
4 bis, rue de la Cerisaie
FR - 75004 Paris
• Fax 01 42 78 08 47 • CCP 85535 D Paris
• Adresse électronique :
esperanto-france@esperanto.org

9

PETITION FRANCE
ET PAYS FRANCOPHONES

sur l'initiative d' **ESPERANTO VIVE** Maison des Associations, FR. 73000 Chambéry
Esperviv@icor.fr tel : 04.79.33.95.50 fax : 04.79.33.95.88

POUR UNE OPTION
ESPERANTO
AU BACCALAUREAT

UNE LANGUE INTERNATIONALE AUXILIAIRE

Les qualités linguistiques et sociales de cette langue internationale sont aujourd'hui assez bien connues à travers le monde. Rapidement accessible à tous, neutre, populaire malgré divers préjugés, l'Espéranto reste parfaitement d'actualité.

De fait, chacun est capable de comprendre l'enjeu que ce mode de communication pratique représente pour l'avenir d'une citoyenneté supranationale, car il respecte dans le même temps les identités régionales.

Sa reconnaissance au sein des systèmes éducatifs de la France et des autres pays est donc un projet culturel légitime et en accord avec les diverses résolutions de l'UNESCO en sa faveur.

L'Europe, et la mondialisation dans laquelle elle s'inscrit, ne peuvent que s'enrichir de cet idéal démocratique fondé sur la Déclaration des Droits Humains.

L'ESPERANTO, option facultative à l'épreuve du BACCALAUREAT, est l'étape initiale pour créer ce processus d'ouverture et favoriser l'esprit d'Humanisme auquel aspirent les peuples et les sociétés.

SIGNEZ ET FAITES SIGNER

Je soussigné(e) : Nom - Prénom / Association / Société / Organisme ... (+ Fonction)

Adresse :

.....
.....
.....

*Déclare soutenir la pétition pour l'étude de l'ESPERANTO en OPTION au BAC et souhaite voir
appliquer les principes de l'UNESCO à son sujet.*

A

Signature :

Le

*Cette pétition peut être reproduite et diffusée vers toutes les adresses utiles puis renvoyer à
"ESPERANTO VIVE Savoie", ou vers les associations espérantistes départementales.
Ses résultats seront régulièrement communiqués aux élus, aux médias et au grand public.*

PROGRAMME DES VERTS

Huit propositions concrètes dans le domaine linguistique -

"Afin de relever le défi linguistique auquel elle est confrontée, l'Europe pourrait favoriser les orientations et dispositifs suivants. ...

(8^o proposition) : la mise sur pied au sein du Parlement européen d'une commission qui serait chargée d'évaluer la pertinence de l'utilisation de l'espéranto comme langue-pont pour la communication transnationale, et pour commencer au sein de l'Union. Dans l'attente des conclusions des travaux de cette commission, les institutions de l'Union pourraient inciter les différents Etats membres à proposer l'espéranto comme langue à option dans les programmes linguistiques.

L'espéranto, une langue de communication internationale

L'augmentation des déplacements et des échanges accroît le désir de communiquer pour échanger, savoir, connaître. Quelle langue utiliser ?

Dans l'Union européenne, par exemple, la solution préconisée est officiellement le multilinguisme. Mais cette solution est irréaliste : qui peut apprendre plusieurs langues à un bon niveau ? Et comment feront pour se comprendre un Finlandais ayant appris l'espagnol et l'allemand, et un Italien ayant appris le français et l'anglais ?

Cette solution est également hypocrite : en France, plus de 80 % des élèves de collège choisissent l'anglais en première langue. Ce phénomène est sensible aussi dans les autres pays, où, par exemple, l'apprentissage du français est en régression.

Il n'y a aucune fatalité à ce qu'une langue l'emporte sur toutes les autres. Il s'agit en fait d'un choix politique. L'anglo-américain est le véhicule de la « pensée unique » libérale.

Face à ce problème, les Verts ont eu le courage de chercher une nouvelle voie, qui réponde à deux objectifs à première vue inconciliables :

- d'une part, respecter, sauver et protéger activement le patrimoine linguistique de l'humanité, y compris les langues minoritaires ;
- d'autre part, chercher une solution réaliste et pratique à l'actuel problème de communication transnational, en respectant l'égalité de tous en matière de langue et de culture.

Une solution est d'utiliser comme langue de communication internationale non pas une langue de communication nationale, mais une langue neutre, conçue dans ce but et n'ayant aucune ambition nationale. Cette langue existe et fonctionne déjà : la *internacia lingvo*, appelée espéranto, qui fut créée en 1887 par L.L. Zamenhof, médecin et linguiste polonais.

L'espéranto n'a pas pour objet de se substituer aux langues des États nationaux, ni de devenir la langue unique des rapports internationaux. Mais la généralisation de l'apprentissage de l'espéranto faciliterait la communication et le dialogue entre les individus et les peuples. D'ores et déjà, les Verts ont recommandé à leurs élus, dans les conseils municipaux, de favoriser l'apprentissage de l'espéranto à l'école dans le cadre de l'ARVEJ (aménagement des rythmes de vie de l'enfant et du jeune). Grâce à sa plus grande facilité et à sa régularité, même les élèves les moins doués pour les langues pourraient l'apprendre et l'employer : sa pratique ne serait pas réservée à une élite. De plus, les propriétés linguistiques propres de l'espéranto en feraient une bonne préparation à l'étude d'autres langues : elle a une valeur propédeutique reconnue.

SPERTO EN FRANCIO

Okaze de ekskurso al Avignon, Cabrières, Fontaine de Vaucluse dum la UK de Montpellier.

Ni speciale atentis, kiam raporto en eskerlanda revuo (ĉfoje en la aprila numero de "El Popola Ĉinio")

mencias nian regionon. Ŝajnas, ke Sro Wang Lihua estis iom "ebrieta post tagmanĝo", pro tio li iom

"pastisumis" alivorte iom konfuzis la trinkaĵojn. Aŭ li speciale aprezis nian aperitivon kaj trinkis ĝin denove por digesti...

Tagmanĝo en franca kampara restoracio

de WANG LIHUA

DUM la pasinta UK okazinta en Montpeliero, Francio, mi plezure ĝuis laŭ tieaj moroj kaj kutimoj tute malsamaj al la ĉinaj. Precipe la tagmanĝo en franca kampara restoracio donis al mi profundan impreson.

LA KAMPARA RESTORACIO

Post pli-ol-duonhora veturado de la antikva urbo Avinjono, nia aŭtobuso haltis antaŭ iu restoracio en kamparo. Tio estas duetaĝa domo, kun ruĝa tegmento, flavaj muroj kaj larĝa elstara balkono, ĉirkaŭita de prosperaj arboj, aromaj floroj kaj berilaj kampoj. En la kamparo sub la tagmeza suno aŭdiĝis nur kantoj de cikadoj.

Laŭ ligna ŝtuparo ni venis al la manĝejo en la dua etaĝo. Kun tempopaso la koloro de ĝiaj lignaj planko kaj muroj malheliĝis kaj impresis per antikveco. Kvar vicoj da longaj tabloj sufiĉis por 200 klientoj. Sur la tabloj estis manĝiloj, butero, fromaĝoj kaj vino. Sur alia longa tablo estis diversaj trinkaĵoj kaj almanĝaĵoj, kiujn oni povis preni laŭ sia prefero. Kelneroj servis kun afabla rideto. Ĉio tio ĝojigis min, kiu venis el Oriento.

EKZERCADO PER TRANĈILETO KAJ FORKETO

Ĉe tablo mi ĝuis francajn manĝaĵojn kune kun miaj amikoj. Helruĝa kaĉo kun salikokoj ŝajne estis apetito-veka. Mi prenis kulereton da kaĉo por gustumado. Ho, ĝi estis iom sala kaj fiŝ-odora. Nia ŝoforo, kiu sidis apud mi, sciigis

min, ke tio estis spicaĵo el salikokoj farita de kamparanoj. La panon mi trovis iom malmola kaj acideta. Malgraŭ ke mi kutimas manĝi rizajon kun pladoj hejme, mi manĝis ĝin pecon post peco kun sufiĉe multe da butero.

Sed kiam oni prezentis al mi pladon el verdaj lentoj kaj koka femuraĵo, mi estis multe embar-



Tagmanĝo

sita. En Ĉinio mi vidis, ke okcidentanoj ne scias kiel uzi manĝ-bastonetojn, kaj ridis pro ilia mallerteco. En Francio estis mia vico fali en embarason, ĉar kiel ajn mi penis, mi ne sukcesis pecetigi la kokaĵon per la tranĉileto. Mi do riproĉis en mi mem la tranĉileton, ke ĝi estas malakra. Ne povante manĝi la kokaĵon pere de la mano laŭ kutimo en Ĉinio, mi povis fari nenion alian ol admiri la lertecon de francaj amikoj en uzado de tranĉileto kaj forketo.

GUSTUMADO DE FROMAĜOJ

Antaŭ longe mi sciis, ke en Francio estas 360 specoj da fromaĝoj. Dum tiu tagmanĝo la restoracio regalis nin per pluraj specoj da fromaĝoj, kies nomon sciigis al mi la ŝoforo. Li demand-

is min, kion mi volas. Montrante la pinton de la fromaĝo en triangula formo, mi respondis: "Iomete." Li ridis. Jen, sur tiu parto estas multe da verdaj makuloj kiel kvinteseneco, do pro tio oni tranĉas fromaĝon ĉiam laŭ ĝia rando, sed neniam ekde ĝia pinto. Tamen, nia ŝoforo detranĉis por mi la pinton. Mi enbuŝigis la peceton kaj maĉetis ĝin. "Krom sala gusto, mi ne trovis guston eksterordinaran." Nia ŝoforo klarigis al mi, ke ĝi estas farita el kaprina lakto kaj oni kutime prenas ĝin kune kun tiu el la bovina. Francoj preferas preni fromaĝojn kune kun vino produktita en sama loko. Mi diris al francaj amikoj, ke escepte de nomadoj, ĉinoj preferas bovinan lakton ol fromaĝo. Franca amiko diris al mi, ke meznombro ĉiu franco konsumas ĉiujare 20 kg. da fromaĝoj, plej multe en la mondo.

EBRIETAJ POST TAGMANĜO

Post kafo finiĝis la tagmanĝo. Nia afabla ĉiĉerono insiste invitis nin al drinkejo. Li proponis al ni *pastis*, bongusta trinkaĵo farita el frukto produktita en suda Francio.

Kiel atendite *pastis* multe plaĉis al ni. Ege fiera pri la longa historio de vinfarado de Francio, nia ĉiĉerono diris al ni, ke jam en antaŭhistorio francoj ekfaris vinon el vinberoj. "Jam antaŭ pli ol 2 mil jaroj la vinber-kulturado kaj vinfarado enĉiniĝis laŭ la Silka Vojo..." diris mi. La vino ja fariĝis nia komuna babiltemo.

Glaso da *pastis* sufiĉis por ruĝigi miajn vangojn. Ankaŭ miaj kolegoj fariĝis tute ruĝaj. Tio memorigis al mi ĉinan proverbon: La homoj nur sin ravas, sed ne ebrigas pro vino. Fakte, ni ebriete ravis nin pro nia interparolo interesa pri kulturo orienta kaj okcidenta. Tiam sinjorino apud mi diris kun rideto: "Vidu, la suno en suda Francio estas tiel frapa, ke via vizaĝo ruĝiĝis ĝis la oreloj." ■

Pézenas

Huit ans pour un tour du monde

Une extraordinaire aventure

Bruno Robineau présentera une conférence audio-visuelle retraçant le périple de huit années de voyage à travers le monde, qu'il a effectué avec son épouse. A ne pas manquer.

Le dimanche 31 janvier à 17 h à Pézenas espace Gare du Nord.

MARYVONNE et Bruno Robineau, originaires de Maine-et-Loire, ont un beau jour quitté leur ferme laitière et pris la clé des champs. Pour un long voyage autour du monde qui allait durer huit années. Ayant choisi d'appréhender la vie des peuples à travers



L'extraordinaire voyage de Maryvonne et Bruno. Photo DR

le monde paysan, ils trouvent leur travail contre gîte et couvert pour partager le quotidien des hommes de la planète. Ils entrent en contact avec un formidable

échantillonnage de milieux sociaux, de l'officier bulgare au cadre japonais en passant par le paysan chinois.

A la rencontre des terres et des hommes" tel est le titre du spectacle audiovisuel

que Bruno propose un grand voyage à travers des cultures et de sensibilités différentes, des kibboutz israéliens aux hauts-plateaux boliviens en passant par l'Inde, le Japon, l'Australie... De très belles images, de l'aventure, un témoignage fort et émouvant car vécu parmi les hommes de tous pays, une réflexion généreuse... C'est le bonheur d'une aventure à visage humain, un regard pour apprécier les autres au-delà de leurs différences et aller à l'essentiel. "Le voyage vécu ainsi, c'est une autre manière d'exister et d'aimer".

Le récit de voyage de Maryvonne et Bruno sera disponible lors de la projection.

Tiu paĝo estis preta por la lasta SFS, sed pro la kutima kialo de spacomanko aperas nur ĉifoĵe. La du artikoloj, antaŭ kaj post la spektaklo en Pézenas, bone reliefigas la valoron de tiu sperto. Skribis esperantisto, t.e. sen paroli pri ĝi antaŭ la konferenco, sed nur ene de la prezentado, ŝajnas bona metodo por konvinki la publikon... Tia evento estas taŭga por konvinki la publikon... Tia evento estas taŭga por konvinki la publikon, montrante ĝin sub tre pozitivaj kaj konkretaj aspektoj".

Ĉu ni invitu Ges. Robineau por nova turneo post kelkaj monatoj? Plej bone estus inviti ilin kadre de neesperantista asocio. Dum nia federacia kongreso estis propono organizi po unu konferencon en ĉiu departemento, kun kompleta aŭ parta financa respondeco de la federacio.

Alia propono, paralela kun la prelegoj, estas donaci la libron de Ges. Robineau en la franca, "Et leur vie, c'est la terre" (120 F), al kelkaj bibliotekoj. Estas ankaŭ rekomendinde al E^o-parolantoj legi la tekston rekte en E^o, la libro tiam titoliĝas "Ili vivis sur la tero". Komencantoj povas legi unue en la franca, poste en E^o aŭ rekte en E^o kun posta kontrolo de la franca teksto. Ni feriu inteligente!

...l'espéranto



LA LANGUE DE L'AMITIE
SANS FRONTIERES

DIAPORAMA

Le tour du monde en huit ans

■ Dans le cadre de la Maison pour tous, Maryvonne et Bruno Robineau ont récemment présenté un diaporama aux Piscénois.

Tous deux originaires de Maine-et-Loire, ils ont un jour quitté leur ferme pour partir à la découverte du monde.

C'est ce « tour des hommes », comme ils aiment à le définir, qui les a conduits, pendant 8 ans, à la rencontre des peuples de toute race, à l'intégration dans les familles avec partage de leurs travaux et de leur vie quotidienne.

Habités par « le feu sacré de l'écoute, de la rencontre et du partage », ils présentaient un diaporama qui a conquis le public par le regard qu'ils ont porté sur leur vécu.

Des kibboutz israéliens aux hauts plateaux boliviens en passant par un village indien, une immense ferme australienne et les mégapoles japonaises, ils retracent leur parcours avec émotion et poésie.

La musique est belle, les images magnifiques.

Le couple y parle aussi de l'extraordinaire ouverture et des innombrables contacts que leur a permis la langue internationale "l'espéranto".

Vecteur de communication et de fraternité, l'espéranto a favorisé le contact avec un formidable échantillonnage de milieux sociaux, comme l'officier bulgare, le cadre japonais ou le paysan chinois.

Le débat a été l'occasion de poursuivre la réflexion sur cette grande expérience humaine.

Le diaporama de Maryvonne et Bruno, au-delà du documentaire et du récit de voyage, narre une formidable aventure humaine qui a enthousiasmé l'auditoire.

Ce couple aventurier retrace également son périple dans un livre intitulé "Et leur vie, c'est la terre".

Le compte-rendu de leur conférence est disponible pour tout public à l'adresse suivante : Bruno Robineau 49270-Landesmont. Contact au 02 40 98 78 76 •

KRUCVORTOJ**HORIZONTALA**

- I) - Kuracil(o).
 II) - Sanktaj libroj.
 III) - Filmoprocedo.
 IV) - Fama demand(o) / s : Terkacxo / Malbel(e) ?
 V) - Nulig(i) sxuldon.
 VI) - Koralmes(o) / Antikva cxfurb(o).
 VII) - s : Antikva placo / E-a Kunveno.
 VIII) - Senkora, sed ne senkarapaca mamulo / Prepozicio / s : Parenco.
 IX) - Batalgas(o) / Prepozicio.
 X) - Salatplant(o).

VERTIKALE

- 1) - Komparacii(o).
 2) - Vegetala venen(o) / Kiel rita mangxo.
 3) - Fama franca gigant(o).
 4) - Frakcio / Greka litero / Ricxe.
 5) - Element(o) / s : Alpasxo.
 6) - Sumera diino / Malvenki en fama ludo.
 7) - Duoblend(a) en muziko / Malnova monunu(o).
 8) - Harema juvel(o) / s : sono.
 9) - Afrika sxtat(o) / Surfac(o).
 10) - Biblia hero(o) / Konkur(i).

Ĉar la difinoj de la krucvortoj estis senditaj perrete, ne estas ĉapelitaj literoj. La litero x anstataŭas ĉapelojn, tiel "terkacxo" estas terkaĉo, "sxuldon" signifas ŝuldon, ktp.

s : sone
r : returnite

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I										
II										
III										
IV				■			■			
V		■								■
VI						■				
VII				■					■	
VIII					■			■		
IX							■			
X										

BOPARO.

La solvoj de la krucvortoj de la numeroj 148 kaj 149 estos en la venonta SFS n° 150.

MODIFITAJ LITEROJ

SOLVOJ : lundo, lando, lardo, mardo.


Kero, sukuro, suturo, saturo, naturo.

Libro, litro, mitro, mikro, makro, makao, kakao.

Libro, litro, mitro, metro, metio, mesio, misio.

Festo, vesto, vento, venko, vinko, ŝinko.

Laŭ la sama principo, po unu modifita litero ĉiufoje, kompletigu :



*Limdato por la venonta SFS : la duan de oktobro
 (dato de la federacia kunveno en Béziers -vidu p.2)
 SFS ĉe Jean Henin - Beaugard, Rte de Montcayroux
 48500 La Canourgue Tel/Fax : 04 66 32 86 36
 Jean.Henin@wanadoo.fr*

Agrablajn
somerveturojn